

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

NIA PENTEKOSTA KONGRESO — SUB AŬSPICIOJ DE LA URBESTRARO KAJ KOMERCA ĜAMBRO

Laŝtore venas de la prezidanto de la kongresa komitato, S-ro Ing. G. Scholze, la ĝojiga informo, ke la II. Ĉeĥoslovaka Kongreso en Liberec-Reichenberg okazos sub la aŭspicioj de la tiea Urbestraro kaj de la Komerca Ĝambro. Per tio nia kongreso fariĝos pli oficiala en la okuloj de neesperantistoj. Tiu fakto espereble havos sian influon ankaŭ ĉe la ceteraj oficialaj reprezentantoj. Invititaj estis ankaŭ la ŝtataj lokaj estraroj, militista komandanto k. a. En la malferma solena kunsido la reprezentantoj de ambaŭ centroj, ĈAE kaj GEL parolinte al kongresanoj esperante, daŭrigos en siaj naciaj lingvoj por diri kelkajn vortojn pri nia afero al la neesperantistaj gastoj.

La ceteraj kunvenoj traktantaj sole en esperanto kaj partoprenataj de samideanoj de malsama lingvo nacia, prezentos specon de labora konferenco internacia. En ili amike, kiel estas kutimo inter samideanoj, por kiuj la interna ideo de esperanto ne estas senenhava brila teorio, la membroj de ambaŭ nacioj, kies politikistoj ne ĉiam kaj ne pri ĉio interkonsentas, traktos la bezonojn de nia movado en nia komuna ŝtato. La ebleco de persona interkonatiĝo certe helpos firmigi la senton de solidareco, kiu estas necesa inter laborantoj por la sama ideo.

La deziroj esprimitaj de ĈAE en la lastaj tagoj estis plenumitaj de la kongresa komitato, kies deziro estas, ke ĉiu kongresano sentu sin en Liberec kiel en sia hejma klubejo.

Ni do ripete vokas al niaj grupoj kaj membroj:

ALIĜU AL NIA DUA KONGRESO!

Petu aliĝilon kun pagilo de S-ro Ing. G. Scholze, (Klotildenstr. 6./II.) Plenu la demandojn de la aliĝilo kaj forsendu ĝin senprokraste kun la kotizo 15 Kĉ. Preparu vin por partopreni en la traktado kongresa. Ĝis nun ne ĉiuj kluboj informis ĈAE pri sia partopreno. La geografia formo de nia ŝtato kaŭzas, ke ĉiam la kongresa urbo estos malproksima por iuj partoprenantoj. Por esti reprezentitaj, la pli foraj kluboj uzu la rimedon proponitan en nia lasta n-ro.

Ni ripetas: Ĝis la revido dum la pentekosto.

R. H.

La komitata kunveno de ĈAE. de la 26 Majo delegis al la kongreso en Liberec: kiel parolanton en la solena malferma kunsido, sian prez. S-on *Eiselt*, kiel referentojn S-ojn *Ginz* kaj *Hromada*.



LITERATURO



J. S. MACHAR:

KORALA TUFO

(El libro „Veršem i prósou“.)

Estas tiaj strangaj neforgeseblaj momentoj en homa animo: subite ekbrilas hela lumo en ĝi, kaj ĉe tiu lumo la animo ekvidas iun mirigan leĝon de l'universo, validan por vivo de la steloj kaj sunoj, de nia tero, de la tuta homaro, de ĉiuj nacioj, por la vivo de individuo, de besto, de insekto, de vegetaĵo kaj ŝtono — kaj en tia momento trakuras la animon ia agrabla teruro, la animo pretigas sin ekkapti tiun vizion kaj fiksi ĝin per racio en sia memoro. Sed, tia momento kvazaŭ ne havas tempan dimension; komparete kun tiu vizio de l'animo, la rapidega fulmo, kiu por momento en mallumo pliheligas la nekonatan regionon, daŭras multe pli longe, kaj la plej rapida ekpenseto estas pli multepeza kaj malrapida. Kaj poste la homo vane serĉas kaj senrezulte rememoras — la vizio jam malaperis.

Io tamen restas el tiuj mirigaj momentoj: la scioto, ke ekzistas kelkaj malmultaj eternaj neŝanĝeblaj leĝoj, validaj kiel por la tuta universo, tiel ankaŭ por ĉiu ĝia eĉ plej lasta atomo, kaj ke tiuj leĝoj estas des pli nepercepteblaj, ju pli simplaj ili estas. Oni antaŭsentas, ke la malkovro de ili estis kaj estas celo de la meditado de filozofoj, de revoj de poetoj, kaj ke por la homo tio signifus la solvon de ĉiuj sekretoj kaj problemoj de l'vivo.

Sed, ĉu oni povas ekposedi ilin? Ĉu oni povas atingi ilin?

Jen, rigardu, en guto de l' marakvo vivas kelkaj centoj da miloj de etaj vivaĵetoj. Unu tia nevidebla animaĵeto konstruis por si dometon sur roko sub mara surfaco. Nevideblan dometon kiel ĝi mem estis nevidebla. Ĝi faris tion, por ke ĝi havu lokon por ripozi kaj kaŝi sin antaŭ siaj murdistoj, same nevideblaj. Tie ĝi travivis la tutan sorton de l'vivo; ĝi ĉasadis, por ke ĝi povu vivi, kaj amis por konservi sian genton. Foje ĝi ankaŭ mortis en tiu dometo. En tiu momento malsuprennaĝis el akva guto ĝia kamarado, ĝi fermis per mureto la mortinton kaj konstruis por si dometon novan, ĉion per materio sekreciita el inter

no de sia eta korpeto. La sorton de sia vivo ĝi travivis simile. Post ĝi venis la tria, la kvara milione kaj milione ili estis, ĝis fine sur la roko en akvo ekaperis malgranda purpura makuleto, kaj ree milionoj konstruadis, vivis kaj pereis, ĝis fine el makuleto devenis makulo, kaj novaj milionoj, ĝis fine el makulo devenis korala branĉeto. Kaj tiu branĉeto kreskadis kaj kreskadis, disbranĉiĝis en kelkajn aliajn, kiu zigzakis tien ĉi tien, tuta korala arbaro elkreskis en verda akvo kaj kolorigis ĝian surfacon per purpura nuanco — kial? por kiu celo? Simple speco de la vivo, unu el formoj de l' Naturo. La celo estas nekonata.

La unua homo rektigis sin, li ekvidis super si la senliman bluan ĉielon kaj ekblekis per kriaĉo de mirego kaj de venka sento. Li trovis grotajn, kie li ŝirmis sian edzinon kaj infanojn antaŭ malbona vetero kaj malamikeco de la bestoj. Li komencis ilin ataki per ŝtono je granda distanco kaj per forrompita branĉo de l' arbo je proksimeco. Miloj kaj miloj, milionoj kaj milionoj da ili vivadis kaj mortadis tiel, la batalo porekzista kaj sinkonserva igis ilin pli sagacaj kaj saĝaj, ili faradis ŝtonajn armilojn kaj eltrovis fajron, sian plej grandan bonfaranton. Siajn kriaĉojn ili kunigadis en certa ordo kaj la primitiva lingvo devenis. En malbona vetero ili kovris siajn korpojn per feloj de mortigitaj bestoj, dum la Naturo laŭgrade forprenis de ili la hararon, ilian unuan vestaĵon. Ili ekkonsciis pri sia supereco je ĉiuj aliaj kreaĵoj, el kiuj kelkajn ili sklavigis por sia profito, aliajn ili murdis por la sama celo. Ili ekposedis la vegetaĵan regnon, fruktojn de l' arboj, legomojn kaj grenon. Ili eltrovis panon. Ili ekposedis la mineralan regnon, feron, ŝtonojn, oron, kupron por fabriki armilojn kaj juvelojn. Ĉion ili faris el instinkto. Fine ili elparolis la vorton „mi“ kaj komencis kompari. Ili vidis, ke ili estas ĉe la zenito de la kreaĵaro.

Sed super si ili vidis ankaŭ ĉielon, sunon, lunon kaj stelojn, ili travivis fulmotondrojn. Ili ne povis pensi, ke per ilia vivo finiĝus la evoluo de ĉio; la elementaj kaj neklarigeblaj fenomenoj de la Naturo teruris ilin kaj en ili naskiĝis la ideo de iu estaĵo, kiu estas super ili, de ilia terura mastro — dio. Ili diligentis konservi lin afabla kaj bonkora al si kaj adoris lin loĝantan en suno, en luno kaj steloj. Poste ili konvinkiĝis, ke estas necese igi lin favora al si. Ili oferdonis al li. En naturo

kaj en si mem ili trovis dualismon kaj analogie ili duonigis ankaŭ sian dion dispartigante la oferdonacojn: al la bona dio ili dankis kaj petis lin, la malbonan ili kvietigis. Dume ilia vivmaniero alprenis novan formon: familio — generacio — komunumo — gento. Al siaj dioj ili donis eĉ edzinojn kaj atribuis al ili certajn funkciojn.

Kiom da miloj kaj ree miloj da jaroj pasis, antaŭ kiam el ĉi tiuj homaj sennomaj kaj etaj koraloj fariĝis nacio? Kiom da milionoj da tiuj individuoj travivis sian vivdestinon, antaŭ ol aperis unu sola malgranda videbla tavolo sur la konstruaĵo de l'homara historio?

La koralaj tufo senĉese kreskadis, ĝi formadis branĉojn, kiuj sin interplektis, interpuŝis, rompiĝis kaj batalis; la loĝejo kaj vivoformo de la estinta generacio ne premis la novan generacion, ĉiu konstruadis ree, pluen al senlima maro de l'eterneco.

Miriga strukturo, tiu purpura koralaj tufo de l'homaro! Kiom da milionoj kaj milionoj da tiuj estaĵoj laboris pri ĝi kaj travivis en ĝi sian vivon!

Kia kolosa laboro de cerboj kaj kiom da viktimoj estis necesaj antaŭ kiam devenis la unua ŝipo, antaŭ ol oni konstruis la unuan domon, la unuan kuirejon, la unuan vestaĵon! Kiam estis ekkantita la unua ario, kiam estis skribitaj la unuaj signoj de la lingvo, kaj la unua poemo, kiam oni faris la unuan statuon kaj pentraĵon? Kiam ek-lumis al homaro la unuan fojon la harmonio de belo kaj kiel oni serĉis ĝiajn leĝojn?

Ho, ve, la homo iras tiom apatie tra la mondo, kaj tamen ĉio, ĉiu ero, kiun li ekrigardas, kiun li tuŝas, pri kio ajn li pensas, ĉio estas miriga afero, preskaŭ miraklo. La cigaro, kiun li fumas, la alumeto, kiun li ekbruligas, la vino, kiun li trinkas, la papero, sur kiu li ĉi tion skribas — ĉio, ĉio estas frukto de mirinda laboro de milionoj kaj milionoj da homaj signifaj kaj forgesitaj koraloj, la homo mem estas unu el ili, li aŭtomate travivas la destinon de sia vivo, fine lia lasta horo venos kaj li estos forgesita kiel ili. Li konstruis sian nevideblan ĉelon sur tufo, milionoj da similaj ĉeloj estas necesaj por la purpura makulo, kaj ree milionoj da similaj makuletoj por formi la unuan branĉon de la tufo. Kaj kiam la tufo estas finkonstruita — por kio oni faris ĝin? Por kiu celo?

Pluen kaj pluen disbranĉiĝas la purpura koralaj arbusto en maron de eterneco.

La meditadoj de filozofoj kaj la revoj de poetoj serĉas ĝiajn leĝojn, leĝojn konformajn al tiuj, laŭ kiuj estas regata la vivo de l'universo. Sed ili trovas nur necertecon, hipotezojn kaj fine detruon. Pri tio ili raportas ankaŭ en siaj verkoj kaj versoj. Momente nur, kiel dum ekfulmo, ili iomete perceptas per sia animo la eternajn kaj neŝanĝeblajn leĝojn, al kiuj la tuta universo kaj eĉ ĝia lasta atomo estas submetita — sed pli frue ol ili povas ekkonscii pri ili, ilin kompreni, jam pasis la momento kaj la vizio kun ili.

Tradukis Rudolf Fridrich.



LA HARPO

Estona popolkanto, tradukita de Hilda Dresen

Harpo kara, harp' orkorda,
harpo arde adorata
voke vibrajn voĉojn vekas.
Fluge la fabeloj fluas,
koraj kantoj trile tremas.

Venu, venu vi, venteto,
sendu la sorĉajn harposonojn
en la rondon de ridantoj,
en la mezon de manĝantoj,
geedziĝon festenantaj,
kie ĉiuj ĝojon ĝuas,
por ke kartoj reve ravu,
por ke koroj fajre flamu!

Venu, venu vi, venteto,
sendu la sorĉajn harposonojn
al la homoj funebrantaj,
por ke la dolor' degelu,
la malĝojo malaperu,
por ke koroj kant' konsolu,
plende koro plu ne ploru!

Rozsáhlá letáková propaganda zahájená letáčky „Esperanto — jednotné jazykové pojítka národů“ (20 hal.) a „Krátký kurs esperanta“ (50 h.) nalezla značné ozvěny mezi četnými jednotlivci i spolky. Ale této akce mohou a musí se účastniti **všichni** českoslovenští esperantisté. Každý nemá možnost a schopnost, aby pracoval pro esperanto přednáškami, vyučováním, články, překlady a pod., ale **každý** může rozprodati nebo rozdati deset i více letáčků a rozšířiti tak známost o naši věci. I ten, kdo sám nechce letáčky rozdávat, může jich určitý počet zakoupiti a dáti známému, který je rozdá. Vydání na 10–50 letáčků jest obětí zajisté nepatrná pro toho, kdo jinak pro esperanto nepracuje, protože nemůže nebo nedovede. Tedy **všichni** do práce! *Kdo víc? (Seznam těch, kdo nejvíce objednali, uveřejnime později.)*



EL SCIENCO



MUC. RIEDL:

NOVA KURACILO KONTRAŬ ARTERIO- SKLEROZO

(Sklerolsirup de ĉeĥa profesoro Dro Mladějovský.)
(Al prof. Štětka.)

Arteriosklerozo estis bone konata jam al kuracistoj en la klasika epoko. Sub tiu ĉi patologia stato ni komprenas du kontrastajn fenomenojn. La unua havas sian lokon en meza substanco de la grandaj arterioj, kie finfine formiĝas ulceroj, en kiujn deponiĝas kalksaloj. La alia patologia procedo havas sian lokon en malgrandaj arterioj, ankaŭ en ilia meza parto, sed krom tio penetras en la eksterajn, sed neniam finas per ulceroj. Pri ambaŭ statoj oni longe ne sciis, ĉu kaŭzas ilin la sama patologia aŭ ne. Ĉar en la grandaj arterioj estas plejparte elastaj elementoj kaj en la malgrandaj tiuj musklaj, ŝanĝiĝas la bildo de la procedo memkompreneble kaj tio signifas du diversajn fiziologiajn statojn.

Arteriosklerozo estas ĝenerala donaco de la maljuna aĝo. Ni trovas ĝin ĉe plejparto da kadavroj de pli ol 60jaruloj; antaŭ 45a jaro de la vivo ĝi estas tute malofta. Estas cetere bone konata fakto, ke tiu ĉi procedo tute diverse progresas ĉe tiuj, kiuj ne estas malfortigitaj de alkoholo kaj nikotino. Sed kiuj estas direktaj, precize difineblaj kaŭzoj, oni ĝis nun ne scias. En la plej novaj raportoj de francaj kaj italaj klinikoj oni certigas, ke vegetaranoj estas pli inklinaj al ĝi ol aliaj. Ĉefa kaŭzo estas plialtigo de sanga premo; Thomayer publikigis interesajn raportojn pri arteriosklerozo en unu familio dum tri generacioj kaj Jamberger skribis multe pri tio, ke 96% de seksaj malsanoj estas sekvataj de arteriosklerozo. Patologia stato, kiel ni supre diris, estas kaŭzo de evoluo de ulceroj, kiuj deformas arterian cilindron aŭ tutan, aŭ de loko al loko, kaj tiuj punktoj estas lokoj de pli malgranda rezisto kontraŭ sangpremo. La plej danĝera estas sklerozo de koraj arterioj kaj de aorto. Ĝi estas kaŭzo t. n. insufficientia mitralis — kordifekto, dum kiu la koro malbone laboras estante lacigita pro granda penado, per kiu ĝi devas dissendadi sangan en arteriojn, kiuj ne estas elastaj, sed homogenaj, forigitaj de influo de nervoj. Achard-Loepper publikigis Roentgenajn fotografiajn en sia „L' Anatomie pathologique“, kie kvanto da kalksaloj estas tiel granda, ke arterioj en mano estas sur filmo tiel bone videblaj, kiel ostoj de tiu ĉi membro.

Nun ni transiru al kuraciloj de arteriosklerozo. Huchard konsilas jodpreparatojn 0,50–1,00 tage dum 2 jaroj. Thomayer uzas digitalinpreparatojn, francaj universitatoj preskribas trankvilan, normalan vivon, vegetaran nutraĵon, germanaj klinikoj laktan kaj karbonhidratajn manĝojn kaj lasttempe, en Ĉeĥoslovakio oni uzas preparaton de doktoro Vlad. Mladějovský. Lia „sklerolsirup“ havas multajn bonajn ecojn kaj ŝajnas esti plej efika kuracilo el ĉiuj superaj; ĝi ankaŭ ne forigas malsanon, sed nur baras la vojon al ĝi, aŭ almenaŭ helpas en okazoj ne plu kuraceblaj. Boteloj enhavas ĉirkaŭ 200 gr. da sirupo konsistanta el hemiaj kombinaĵoj, kies detala proporcio estas sekreto de la fabriko, sed

ni povas laŭ efikoj konstati, ke ĝi enhavas ankaŭ digitalin*, digalen- kaj strofantin-† kombinaĵojn, kiuj trankviligas koron kaj regulas sangan cirkuladon. Lia eltrovo havas sciencan fundamenton kaj en manoj de kuracistoj ĝi promesas multe, kvankam en tiu ĉi fako de la internaj malsanoj oni ankoraŭ ne diris sian lastan vorton.



RADIOTELEFONA KONFERENCO GENEVE 22-23. APRILO 1924.

En Genève okazis la 22.-23. Aprilo Prepara konferenco por internacia radiotelefona interkonsento, kiun partoprenis 39 stacioj, societoj, kompanioj aŭ administracioj de Radio, de Telefono aŭ Telegrafo el Anglio, Francio, Germanio, Italio, Ĉeĥoslovakio (S-roj Pitlík kaj Inĝ. Scholze), Nederlando kaj Svislando.

La konferenco traktis pri gravaj problemoj, kiujn naskis la surpriza disvolvado de la senfadena telefonio: 1) apartigo de ondolongecoj, por ke certaj kampoj de ondolongoj estu rezervitaj al la telefonio, sekve de kio ĝi ne estus ĝenata per ondoj telegrafiĝaj.

2) helpa lingvo internacia, ĉar la homa parolo iras radiotelefone trans ĉiujn limojn kaj renkontas barilon de diverslingveco,

3) krei centron por interkonsentado pri diversaj necesaj, por interŝanĝi horarojn k. s.

Pri la dua punkto oni konstatis, ke jam 40 esperantaj radiotelefonaj paroladoj estis disaŭditaj el 7 malsamaj landoj (Britlando 9, Usono 6, Ruslando 6, Svislando 6, Ĉeĥoslovakio 5, Kanado 5, Francio 3). Ĉar parto da delegitoj debatis en esperanto, la alia parto vidante la taŭgecon de esp. por trakti teknikajn temojn, konsentis esprimi unanime la rekomendon, ke ĉiuj radiostacioj brodkastu en esperanto almenaŭ unu vesperon ĉiusemajne, je difinita tago, kaj kiom eble plej disaŭditu esperantan kurson, ĉar tiu lingvo montriĝis facila, klare aŭdebla kaj jam disvastigita inter aŭdantoj de ĉiuj landoj laŭ konsiderinda proporcio.

Ŝajnas efektive, ke nur uzante lingvon internacian la radiotelefonio plene utilis, ĉar sen ĝi, kiom helpas al la posedanto de ricevilo aŭdi divestandajn komunikojn, se li ne komprenas iliajn lingvojn?



SCIENCA ORGANIZO DE LABORO

Internacia kongreso por scienca organizo de laboro okazos en Praha la 21.—24. julio 1924. En 8 kunsidoj ĝi traktos pri psikotekniko, sistemo salajra, partopreno de laboristaro je profio kaj posedajo. Scienca organizo en fabriko, vendado kaj trafiko. Administrado de komunumo kaj de ŝtato. Klopodoj organizi ŝtaton kiel komercan tuton. Instruado pri la scienca organizo de laboro. La kongreson vizitos parto de ĉeestantoj de la Londona konferenco pri energio. Postulu informojn, ankaŭ en esp.-o, de la Kongresa komitato Praha II. Jindřišská, 3 aŭ New York, 29 W 39 Street.

*) digitalin-o, digalen-o estas hemiaj produktoj de Digitalis purpurea (ĉeĥe náprstník).

†) strofantin-o estas enhavita en folioj de l' arbo Strophantus Kombe aŭ gratus, kiu kreskas en Afriko ĉirkaŭ Zambezi, Ni konas kaj uzas precipe du preparatojn nome: Strophantinum Böhringer kaj Str. Thoms.

ESPERANTA MOVADO

ĜENEVAJ KUNVENOJ

(Kelkaj aldonoj al la raporto en la lasta n-ro.)

Inter la debatoj de la konferenco de K. R. kun U. E. A. tre interesa estis la punkto pri Centra Biblioteko en la Centra Oficejo Pariza. Tiu ĉi biblioteko enhavanta ĉiujn eldonaĵojn esp-ajn, komencante per la lernolibroj de Zamenhof ĝis la eldonoj antaŭ la eksplodo de la milito estis fondita de generalo Sébert, pliriĉigata per donacaj ekzempleroj de diversaj eldonistoj kaj klasigata laŭ decimala sistemo ĝis la jaro 1911. Sed de tiu tempo estis iom malfacile por la malavara fondinto daŭrigi la financon zorgon. La Centra komitato estis preta doni iun sumon por lui ĉambreton, kie la biblioteko estus deponita ĝis la tempo, kiam estos eble pagi oficiston, kiu daŭrigus administradon kaj klasigadon de la libroj. En Genevo la britaj samideanoj informis, ke ili vidas eblecon de bona administristo en London, se generalo Sébert nuligus la kondiĉon, ke la biblioteko devas resti por ĉiam en Paris.

La kunveno Ĝeneva decidis do:

La C. K. ne rajtas decivencii la bibliotekon en Parizo, se ĝi ne estos transdonita kun ĉiuj rajtoj al C. K. kaj en tiu lasta okazo la C. K. rajtas elspezi por ĝia konservado ne pli ol kvaronon de sia jara budĝeto. La C. K. tuj klopodu akiri la plenan posedon de la biblioteko traktante kun la konservanto, generalo Sébert, al kiu la tuta esperantistaro estas danka pro tiu valora fondaĵo.

Post la raporto de S-o Schade pri la XVI. kongreso en Wien, oni debatis pri la mono de la antaŭaj kongresoj kaj pri la nuna rolo de Konstanta Komitato Kongresa. D-ro Privat, klarigas, ke post la funkciigo de la kontrakto de Helsinki, la K. K. K. devus fariĝi subkomisiono de la Centra Komitato, sed kelkaj ĝiaj membroj (Warden kaj Sébert) ne akceptis tiun situacion kaj volas daŭrigi la antaŭan sistemon. La C. K. mem ne estas informita pri la ĝisnunaj kontoj kaj estus necese komenci sur nova bazo. Post vigla debato la kontraktantoj de la ĉarto de Helsinki modifas ĝian 4 art.:

La Centra Komitato okazigas la universalajn kongresojn kaj komisas ilian lokan aranĝon al la loka organiza komitato.

La decido fariĝos valida post konfirmo ĉe Naciaj Asocioj kaj U. E. A.

R. H.

LA XVI. EN WIEN

6.-14. Aŭgusto 1924

La programon de la kongreso ni presos post ĝia ricevo el Wien.

Aliĝo kostas 50 Kĉ antaŭ la fino de majo. Poste ĝi kostos almenaŭ 60 Kĉ. Aliĝiloj kaj mono perataj de CAE, estos kune senditaj al Wien fine de majo. Tuj poste ĉiu ricevos kongreskarton, kiu estos legitimacio por ricevi rabaton ĉe la aŭstria pasportvizejo kaj ĉe la eldonejo de aŭstria fervoj-biletaj.

Vojaĝo. En Aŭstrio rabato: veturante per rapidvagonaro oni pagos tarifon de ordinara vagonaro.

En Ĉeĥoslovakiĝo karavano de 30 personoj rabato 20%. Postulu 24 horojn antaŭ la forveturo, ĉe la staciestro.

Se la speciala vagonaro de la Ĉsl. Vojaĝa Oficejo efektiviĝos, la rabato estos pli granda ol 20%. Ni petis pluajn informojn de Ĉedok, kiujn ni poste presigos.

VIZITO DE KONGRESANOJ AL PRAHA

Laŭ informo de S-o Max Blankenheim en Berlin estas preparata karavano Berlin—Wien, kiu venos al Praha marde la 5. aŭgusto je la 16 horo kaj forveturos la sekvontan tagon je la 7a matene por esti je la 14:50 en Wien. Ĉeĥoslovaka Asocio Esp. en Praha zorgos pri rabato vojaĝa kaj viza en CSR; Esp. Klubo en Praha zorgos pri loĝigo kaj gvidado. Speciala aranĝo estas projektata, kiu ebligis al partoprenantoj vidi multon vidindan en kelkaj horoj.

Ĉiuj samideanoj, kiuj povas direkti sian vojaĝon al la kongreso tra Praha, estas sincere invitataj viziti la belan urbon Praha, ĉarme lokitan sur bordoj de la rivero Vltava, riĉan per antikvaj kaj modernaj vidindaĵoj.

GRAVA INFORMO POR VOJAĜANTA JUNULARO!

Konsiderante, ke la vasta turisma rilato de junularo inter diversaj nacioj grave helpus la kreskon de solidareco interpopola, la Klubo de ĉsl. turistoj en sia ĝenerala kunveno [Brno 6. Aprilo 1924] akceptis per voĉoj de ĉiuj delegitoj el la tuta respubliko la proponon de S-ro Rud. Fridrich, profesoro en Král. Pole, ke la studentajn dumnoktejojn [dormejojn] de tiu ĉi klubo povu uzi ankaŭ aliŝtataj junuloj, kiuj konas esperanton kaj estas membroj de U. E. A.

La dormejoj estas uzeblaj sub la samaj kondiĉoj kiel ilin uzas la ĉeĥaj studentoj. Ĉar la pago estas tre modera, la junaj membroj de U. E. A. ricevas eblecon malmultekoste vojaĝi en la respubliko ĉeĥoslovaka, riĉa je naturaj belecoj. Detalajn informojn donos volonte la red. de La Progreso.

STATISTIKO DE OFICIALA INSTRUADO DE ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

En la du lastaj lernejaroj 1921/22 kaj 1922/23 oni instruis oficiale esperanton kiel fakultativan fakon en sekvantaj lernejoj kun la ĉeĥoslovaka instrua lingvo: 1) Laŭ dekreto de ministerio de instruado kaj popola klerigo el 27. III. 1921 nro 5545/21: en realgimnazioj en Beroun, Brno-Královo Pole, Litovel, Pardubice, Roudnice kaj en reallernejoj en Bratislava, Pardubice, Praha. 2) Laŭ provizora instruplano por Komercaj akademioj: en Komerca akademio en Hořice. — 3) Laŭ specialaj permesoj de ministerio: en civitanaj lernejoj en Ĉ. Budějovice, Bystrice p. H., Bratislava, Holešov, Místek, Praha VII; en popolaj lernejoj en Kostelec n. Č. L. kaj Holešov; en supera industria lernejo en Brno. Ĉie estis ĉiam sole unu klaso, kaj oni instruis laŭ instruplanoj proponitaj de la instruantoj mem unu aŭ du horojn semajne. En klasoj estis plejmulte 16 kaj plejmulte 68 lernantoj. Ie lernis esperanton ankaŭ la lernantoj mem en la „klerigaj rondetoj“, ofte kun kontrolo de profesoroj. Tiaj rondetoj ek-

zistis en Beroun (Komerca akademio), Brno (Gimnazio), Třebíč (Realgimnazio), Jilemnice (Realgimnazio), Slezská Ostrava (Realgimnazio), Kladno (Realgimnazio), Tišnov (Realgimnazio), Kyjov (Realgimnazio). Entute partoprenis dum la du nomitaj lernejoj 844 lernantoj kaj en klerigaj rondetoj 350 lernantoj. — Tiu ĉi statistiko koncernas, sole lernejojn kun la ĉeĥoslovaka interna lingvo. Ĝi estis farita de Esperanta sekcio ĉe Centra societo de la ĉeĥoslovakaj profesoroj. Ciferojn pri la german- kaj hungarlingvaj lernejoj ni donos pli poste.

S. K.

LINGVA FAKO

PĚKĤLAD V. TEXTU

Daŭrigante vian klerigadon, gvidu al tio ankaŭ viajn infanojn. Ne amasigu monon por ili, sed ne bedaŭru ankaŭ la lastan speson por ilia klerigo. Instruu ilin esti fieraj, sed sole je tiu ĉi klerigo, ne je posteno, ne je titolo. Estu poste viaj infanoj kio ajn — ili portu en ĉiu situacio la fieran konscion de sia „mi“ kaj vi kredis, ke tiam neniu laboro sendignigos ilin, ke neniu profesio dononta al ili vivrimedojn, ŝajnos al ili malpli valora. La klereco de viaj infanoj estu la plej kara heredaĵo, kiun vi postlasos al viaj filoj kaj la plej bela doto, kiun ricevos viaj filinoj.

VII. TEXT K PĚKĤLADU

Je nutno jednati stejným způsobem se všemi lidmi? Ani zdaleka ne! Bylo by nespravedlivo udělati pro jednotlivce líného, nevzdělaného nebo egoistu to, co máme udělati pro člověka vyššího duchem neb povahou; je tedy naši povinností řídití svoji úctu a svoji oddanost k druhým dle ceny jich mravní osobnosti, nikoliv dle jich rodu, jich bohatství a titulů.

(Lalande).

ĈEĤISMOJ

Fráze, jichž doslovný překlad nedal by logického smyslu. Většinou nutno překládati dle smyslu. Někdy možno zachovat i obraz, na př. 8. Přinášíme pokus o překlad některých z těchto rčení, jež nám zaslal p. J. Ježek z Prahy. Zveme čtenáře, aby se pokusili o event. jiný překlad těchto rčení, jakož i aby nám zaslali rčení jiná, třeba bez překladu.

1. Nejde mu to pod nos. Ĝi iel ne plaĉas al li.
2. Neĥci ti lézti do zeli. Mi ne intencas [far-] iĝi via [am]rivalo.
3. To mně nejde do hlavy. Tlon mi ne tute konceptas.
4. Já za to nemohu. Mi ne estas kulpa je ĝi. Ne estas mia kulpo.
5. Do toho mi nic není. Tio min ne rilatas, ne koncernas Ne estas mia afero.
6. To je mi jedno. Estas indiferente por mi.
7. Nemohu ho vystát. Mi ne kapablas lin toleri.

8. Nestrkej do všeho nos. Ne intermiksiĝu en ĉion. [v. Z.: Ne ŝovu nazon en fremdan vazon.]
9. Nestoji to ani za řeč. Ne menciinde.
10. Vyhodil si z ko-pejtká. Li iomete diboĉis.
11. Hleď si svého. Zorgu pri via [propra] afero.
12. Z toho obchodu nic nekouká. Tiu negoco promesas nenian profiton.
13. Nedej se vysmát. Ne ridindigu vin.
14. Udělal to jen tak halabala. Li faris tion nur supraĵe; senzorge.
15. Zapiš si to za uši. Memoru ĝin bone.
16. Všeho je odsud až potud. Ĉio havas sian limon.
17. Nerozumím tomu ani za mák. Mi komprenas ĝin eĉ ne iomete.
18. Nejsem v počtech tak honěný. Mi ne estas tiel lerta en matematiko [kalkuloj].
19. Rád si zalhal. Li emis mensorgi.

VORTARO ESPERANTO-ĈEĤA

Kompletigo de Rud. Hromada.

Vortoj ne troveblaj aŭ korektindaj en la Vortaro esp.-ĉeĥa de Th. Ĉejka. Signo (n) signifas: nova, ne rekomendata vorto. (Daŭrigo.)

fluso příliv; mal- odliv
 flustri ŝeptati
 foino kuna skalni [v bílém poli
 fono pozadí, pole; verda stelo sur blanka fono
 forsto (n) les pěstovaný, -isto, -istejo,
 [-kulturo, -ista akademio
 frakcio frakce (polit.) 2) zlomek
 freto, frajto, fracht, dopravné
 frezi vykrúžovati, -ilo, -maŝino
 fugi (n) utéci, uprchnouti, ne jen forkuri
 fuko chaluha
 fuliko lyska (pták)
 fumario zemědým
 fusto dřik sloupu, pažba
Galimatio slátanina
 galinago bekasina, sluka otavní
 gambo (n) noha (celá okončetina)
 gelato rosol
 genisto kručinka
 ĝiĉeto okénko u přepážky (na poště, v bance)
 gimnoto úhoř elektr.
 gisi (n) formverši, odlévati, gisi stansoldatojn
 gladiolo mečkl. (rosl.)
 glekomo popenec (rosl.)
 glumo pleva
 grajlo krupka, -as padají krupky
 graviti gravitovati, -ado
 grefti štěpovati, roubovati
 grenado granát zbraň
 grenato granát kámen
 grimpi šplhati, -obirdoj, sur-i (Daŭr.)

Ĉu vi jam estas U. E. A-ano?

BIBLIOGRAFIO

Škola esperanta. Učebnice. Rozmluvy. Čítanka. Pro začátečníky i pokročilé sestavil a vydal H. K. Bouška. V Praze 1923. Nákladem Josefa Springera v Praze, Kurs 1. (10 sešitů.) Cena 30 Kč. — Jest nesporné, že přes existenci mnoha kursů i přes školní vyučování esperantu budou nejlepší jeho znalci za svou obratnost a pohotovost v jeho užívání děko-

nické i slohové. „Lidový kurs pro začátečníky“ je jistě nejpromyšlenější kurs i co do metodiky i co do obsahu zásoby slovní. Jistě pouhý začátečník, který jej svědomitě probere, osvojí si velmi dobré i rozsáhlé základy esperanta. Avšak i pokročilý esperantista mnoho získá a si ujasní pouhým pročtením kursu. Pro učitele je neocenitelný „Cvičný text pro kursy esperanta“, který podává systematicky pro potřebu kursu ustanovenou zásobu příkladů počínaje abecedou a sestavami slov z mezinárodních kmenů a konče „příklonným slovcem pro zevšeobecnění ajn“. Velmi poučný je též „Výklad slov často



Brusičská rodina

Ant. Růžička

